I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

# Informa Bulteno

ESPERANTO

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. I. Germano

Via Donato Creti N° 61

N° 1 - Oktobro 1954

<u>Comunicato</u>

Con la chiusura del IV° Congresso di La Spezia, si è aperto l'anno finaziario 1954 - 1955.

I Soci possono fino da questo mese rimettere la quota di adesione a Socio, alla Segreteria, quota che ammonta a £.800.= annue che saranno così ripartite: £.240.= alla I.F.E.F. = £.250.= alla F.E.I. = £.310.= alla I.F.E.A.

Per i Soci che rimettono la quota F.E.I. direttamente, rimetteranno alla nostra Segreteria solo le quote I.F.E.F. e I.F.E.A. in ragione di £.590.=

Ricordiamo ai nostri Soci il dovere di abbonarsi alla rivista "Esperanto" il cui importo è di sole £.200.= che possono essere rimesse alla nostra Segreteria.

Le quote possono essere rimesse anche in più riprese.

========

Il nuovo CONSIGLIO DIRETTIVO nominato dal Congresso di La Spezia, è convocato per il 7 Novembre alle ore 12 a Parma. Luogo del convegno in stazione.

Tutti i componenti il C.D. sono pregati di intervenire.

<u>PROTOKOLO DE LA KUNSIDO DE LA IVa NACIA KONGRESO DE I.F.E.A.</u>

La 26.n de septembro 1954, ĉe la sidejo de la "Dopolavoro Ferroviario" (Fervojista post-labora amuza Klubo) de La Spezia, je la 9.a kaj duono, malfermiĝis la IVa Nacia Kongreso, kiun organizis Samideano FONTANA, en kunlaboro kun la Estraro de tiu Klubo.

Ĉeestis pli ol trideko da Delegitoj Reprezentantoj de la diversaj grupoj el, Udine, Verona, Bologna, Forlì, Milano, Torino, Voghera, Genova, La Spezia, Roma k.t.p. krom la reprezentantoj de la esperantistaj Grupoj de apudaj lokoj, kaj ankaŭ tiu de la Aŭstria Fervoja Esperanto Federacio, gvidata de kolego Angermajer el Linz.

Kav. ZACCONI, prezidento de I.F.E.A. malfermas la kunvenon dankante Samideano Angermajer, kiu volis ĉeesti nian jarkunvenon, kiel ankaŭ la Samideanojn nefervojistojn kiuj akceptis la inviton esti ĉe nia flanko en tiu ĉi okazo. Li poste legas la skribajn aliĝojn kiuj alvenis al la Kongreso, unua inter kiuj, tiu de Prof. CANUTO, Prezidanto de Itala Esperanto Federacio, postulita aliloke de profesiaj devoj, de la Sekretario de I.F.E.F., Samideano Lok, de la Esperantistaj Fervojistaj Feracioj de Francujo, Danujo, Saarlando, Svisujo, Nederlando, kaj de la Italaj Grupoj de Massa, Genova, Florenco, Lucca, La Spezia k.c.

ANGERMAJER portas la saluton de la Aŭstriaj kolegoj samideanoj kaj dankante pro la invito ĉeesti la kunvenon, rememorigas la kazon de tiu aŭstria piedpilkludisto kiu, invitita ludi en unu el la parizaj Societoj, deklaris ke li konas nur unu lingvon krom la sian, la Esperantan.

D.ro BORIONE, Sekretario de F.E.I. portas la saluton de la italaj esperantistoj

D.ro. CAMPETTI el Lucca portas la saluton de la samideanoj de sia urbo, esprimante la deziron de feliĉa sukceso al la 40.a Mondkongreso en Bologna.

Samideano Massa el La Spezia, siavice portas la saluton de la Universala Akademio por la studado de la okultaj sciencoj, kiu havas sian sidejon en Triesto, kaj deziras kontaktiĝi kun la esperantista movado, kaj petas ke oni sendu al ĝi ekstrakton de la protokolo de la kunsido.

Unua punkto de la Tagordo, la Prezidanto Kav. ZACCONI eksponas sian raporton tra la atento de la ĉeestantaro, kaj reliefigas la laboron faritan dum la pasinta jaro, aplaŭdata ĉe la plej gravaj punktoj kaj salutata per varma plaŭdado je la konkludo.

La raporton estas la jena:

Kun la fermo de la IIIa Nacia Kongreso, okazinta en Como, Aŭguste de 1953 ĉe la flanko de la Itala Nacia Kongreso de F.E.I., malfermiĝis la IVa jaro de ekzistado de nia Itala Fervojista Esperantista Asocio (I.F.E.A.), kiu havis antaŭ si ne malgravan taskon plenumigotan ekster la propagando kaj sia disvastiĝo, t.e. la organizado de la Internacia Kongreso de la Fervojistaj Esperantistoj: taskon kiun promesis preni sur sin la Veronaj kolegoj fronte al la antaŭa Internacia Kongreso en Utrecht.

Administrado de I.F.E.A. kaj organizado de la Internacia Kongreso estis du taskoj kiuj iamaniere povis sin reciproke kompletiĝi, sed la Sekretariaro devis nepre oferi favore de la Kongreso la plej parton de siaj tempo kaj zorgoj por ke ĝi bone sukcesu kaj kontentigu la kongresanaron.

I.F.E.A.- kvankam ĝi ne haltigis - sendube malplirapidiĝis en sia disvastiĝo kompare kun la antaŭa jaro, sed ni estas konvinkitaj ke ĝuste depende de la okazinta Internacia Kongreso, ĝi dum la estonta jaro regajnos la perditan tempon, duobligante la nombron de sia anaro; kion montras al ni la informoj kiuj de pluraj partoj atingas nin, ekzemple de Milano, Torino, Napoli, Mantova, Verona ktp.

Kiel ajn ni povas ekskribi en la aktiven de nia Asocio: la ĉiumonatan eldonon de nia "Informa Bulteno", kiu, post Como, eliras plibonigita, dank'al la zorgoj de sia redaktoro p.i. Gimelli de Bologna, kaj etanpliigon en la nombro de niaj asocianoj. Tiu pliigo - kies antaŭenpuŝo devas esti unu el la plej gravaj celoj de la nova estraro, al kiu la IVa Nacia Kongreso konfidas la direktadon de nia Asocio - estas tamen ankaŭ devo de ĉiu Grupo kaj de ĉiu membroj; ĉar nia Asocio, jam matura en sia organiza strukturo kaj en siaj kadroj, devas marŝi senhezite laŭ tiu ĉi vojo, konsiderante ke ĝia nombro konstituas ĝian forton, kaj nur per granda nombro ĝi povos atingi tiun, kiu estas unu el ĝiaj plej gravaj celoj: la rekono de nia Asocio kiel branĉo de la "Dopolavoro Ferroviario" kultura sekcio fare de la Fervoja Administracio.

La morala avantaĝo kiun eltirus nia Asocio de tiu rekono, sendube kompensus ĉiu ajn el niaj membroj, kaj konsekvence ni opinias ke li dediĉos sian tutan aktivecon kaj spiriton de konvinkita kamarado por la plibonigo de la membraro kaj de la Grupoj laŭ nombro kaj kvalito, pli el li faris ĝis hodiaŭ.

Ni rekonas ke tiuj kiuj tre sindone organizis kaj direktis esperantajn kursojn por fervojistoj en la diversaj centroj de la lando estas indaj de nia plena dankemo, eĉ se post la fino de la kursoj ili forlasis la novajn esperantistojn al ilia sorto, sed ni devas de nun, ne nur multobligi la kursojn, sed admoni niajn

estontajn lernantojn, ke post la fino de la kurso ili havas moralan - ne nen ne_pran - devon ali^gi al nia Asocio, konsi derante ke la partopreno al sana organi_zacio ili restos ĉiam Esperantistoj, dum, se neorganizitaj, ili estus nenio pli ol velkantaj folioj, kiuj volas momente tra l'aero, sed tuj falas teren senvivaj. El ilia lerando restus al ili nenio pli ol gramatiko pli-malpli ĉifita, kaj kelkaj eksterlandaj ilustritaj poŝtkartoj, fermitaj en la tirkesto de la memoraĵoj por rememori de tempo al tempo momentan kapricon kaj periodon de tempo vane perdita.!

Sed, revenante al tiu kiu estis nia preciza kaj grava tasko de l'pasinta jaro ni parolos pri nia VIa Internacia Kongreso okazinta de la 3a ĝis la 8a de Majo en Verona, Kongreso kiu reprezentis veran sukceson por nia movado, ĉu inter la parte_prenintaj mem, ĉu pro la disvastigo de la radioinformoj, kaj precipe en la kongre_surbo.

Efktive ne estis renkontintaj multe da skeptikismo en ĉiuj sektoroj de l'urba vivo al kiuj ni nin adresis petante helpojn aŭ konsentojn por la organizado de la Kongreso, skeptikismo kiu transformiĝis en malkaŝita laŭdo flanke de ĉiuj poste, kiam ili havis la praktikan pruvon de la graveco de nia movado kaj de la Kongreso, kiu malvolviĝis en alta nivelo de serozeco, imponante sin al la skeptikaj urbanoj de Verona, kiuj taksadis nin kiel entuziasmulojn, taŭgaj per nesciataj eksorcizoj, anstataŭ ol personoj kunvenitaj por diskuti serion da gravaj problemoj rilataj al delikata internacia servo, kia estas tiu de la fervojaro.

Bonegan sukceson havis la Kongreso pro la nombro de la partoprenintoj - pli granda ol tiu de ĉiu al la antaŭaj - kiu an ciferoj prezentiĝas jene:
AŬSTRIO 32 = BELGUJO 3 = DANLANDO 29 = FINLANDO 13 = FRANCUJO 99 =
GERMANUJO 216 = ANGLUJO 9 = ITALUJO 38 = NORVEGUJO 4 = NEDERLANDO 70 =
SVEDUJO 16 = JUGOSLAVIO 4 = SVISUJO 7 = SAARLANDO 1 = sume 541 ĉeestantoj; plie donis sian aliĝon kiel simpatiantoj, ne povante ĉeesti pro malebleco, 25 aliaj fervojistoj: DANAJ 2 = FINNLANDAJ 3 = GERMANAJ 2 = ITALAJ 12 = NEDERLANDAJ 1 = SVEDAJ 3 = SVISAJ 1 = AUSTRALIANOJ 1 = tiel ke ĉiuj kune la aliĝintoj al la Kongreso atingis la nombron 566.

Bonega estis la organizado de ĉiu kampo, kiom pruvas la postkongresaj oficialaj kaj personaj leteroj alvenintaj de ĉiu lando, same kiel la komentoj kiuj aperis en kelkaj Naciaj Bultenoj kiujn ni ricevis g^is nun, eĉ se okazis kelkan kontrastoh kun iu hotelisto, kiu tentis malrespekti la interkonsentoj.

Unika makuleto oni povas riproĉis ĉe la organizado, nome la preterlasita sta_rigo de Presoficejo, kiu povu sekvi la laborkunsidojn (la kongreslaborojn)kaj tiel kontentigi la postulojn de la urba preso kaj de la presagentejo "Ansa" kiej sen_ĉese turmentis nin petante informojn, kiuj ni povis doni nur framente; ĉar la mem_broj de la L.K.K. prematajde senfinaj petoj, demandoj, zorgoj, ne ĉiam utilaj nek necesaj, fare de la kongresanoj, ne povis sekvi la kongreslaborojn.

Granda estis la laboro plenumita de malmultaj personoj por ke ĉio funkciu kiel ĝi devas funkcii, celante la regulan malvolviĝon de la kongreslaboroj, kaj tio montra kiel la sindono kaj la firma decido atingi la difinitan celon (en nia kazo la disvastigon de esperanto pro ĝia taŭgeco kaj utileco) povas doni la deziratajn fruktojn.

Kaj krom la iam citita rekono flanke de la Urbaj Instancoj kaj Instituciojkaj de la urbanoj mem pri la seriozeco kaj utileco de Esperanto, unuafoje ni havis la plezuron kalkuli la partoprenadon de nia Fervoja Administracio, per la persono de S-o.Inĝ.ANGELINI, ĉefkompartimentestro de Verona, per la akcepto de la honora pre_zidanteco de Lia Ekscel. la Transportministro Hon. B. MATTARELLA, same kiel la ĉeeston je la solena malfermo de la Reprezentantoj de la Urbestro de Verona, de la Provinca Administracio, de la Provincestro, de la Provinca Turisma Instituco (kiu ĝentile donacis 1000 ekzemplerojn de urba faldafolio en Esperanto) kaj de

aliaj institucioj kiuj donis sian financan kontribuon por la sukceso de la manifestacio, nome la Sparkaso, la Banca Mutua Popolare, la Komerca Ĉambro, la Provinca Administracio, la Verona Komunumo, la Komunuma Helpa Institucio kiu prestigis por ni apratan kolektivan servon por la manĝoj, kaj Sin. Ferruccio Albarelli (tipografeja mastro); enfine ni devas menciі la tre utilan nekomparebla helpon kiun donis al ni unu el niaj amikoj ne fervojisto, Esperantisto Doktoro Paolo Bonomi, kiu atingis mobilizi areton da ĝentilaj fraŭlinoj por la malfacila kaj peniga "logistika" servo.

Ni bedaŭras unu aferon; ĉi jare ne astis al ni eble okazigi - kiel dum la antaŭaj jaroj - nian nacian Kongreson flanko de la Nacia Kongreso de l'Itala Federacio; sed la libertempo jam ĝuita de niaj asocianoj okaze de la Internacia Kongreso kaj la postuloj de la fervoja servo, ne permesis al ni ĉeesti en Sassari, kiel ni ĉeestis en Pisa, Bologna kaj Como.

Eble tio rezulton ne malbono, ĉar tiamaniere nia Kongreso estos plia nacia manifestacio. Al ĝi estas invititaj ĉiuj grupoj pli proksimaj al La SPEZIA, kune kun la reprezentantoj de ĉiuj Naciaj Federacioj Adherintaj je nia Internacia Asocio, laŭ la laŭdinda kaj imitinda ekzemplo de la Francaj Fervojista Esperantistoj, kiuj ĉiujare for sendas inviton partopreni je sia kongreso al la diversaj Naciaj Asocioj.

Fervojaj centroj kie ekzistas esperantistoj membroj de I.F.E.A. estas:
TRIESTE - TARVISIO - UDINE - TREVISO - VICENZA - VERONA - MANTOVA - BOLOGNA - FORLI' - MILANO - TORINO - VOGHERA - GENOVA - LA SPEZIA - PISA - ROMA - NAPOLI.
Ni ne povas diri ke ili estas multaj, ni povas diri ke oni povas tamen ili mult obligi se ni decide tion volas, kiel estas nia precisa devo.

Sekvas mallonga diskuto je kiu partoprenas:
GIMELLI el Bologna kiu rimarkas la mankon en Verona de afiŝoj anoncantajn la internacian kongreson okazantan el la urbo;
LA MURA el Forli kiu plendas pro tio ke en sia urbo Esperanto pene disvastiĝas inter la fervojistoj, dum ĝi trovas pli favoran terenon en aliaj medioj de la urbo mem. Tamen li informas ke oni atingis kelkan etan progreson ankaŭ inter fervojistoj.
GIMELLI el Bologna reprenas la parolon, petante kunlaboron de la membroj en la redaktado de la Informa Bulteno, por ke ĝi ne fariĝu sole la raportanto de la voĉo de la Sekretariejo, publikigante ĝiajn komunikajojn.
D.ro BORIONE el Torino, petas de la fervojistoj pli intima kuniĝo kun la F.E.I., precipe per abono al ĝia revuo "L'Esperanto", kiun tre malmultaj fervojistoj abonas.
ALCIATI el Torino, petas ke oni alsendu al li pli multe da ekzempleroj de la Bulteno, ĉu por ke li povu ilin disdonigi al la novaj membroj, kies nomojn li konatigos, ĉu por propagando en la urbo Alessandria.
CARENA el Voghera petas ke oni sendu cirkulerojn en la uzinoj kaj aliaj fervojaj instaloj.
GIMELLI el Bologna petas siavice ke oni sendu cirkulerojn al Fervojaj Post-laboraj Kluboj, invitante ilin organizi kursojn por fervojistoj.
TREVISAN el Udine informas ke, se li ve de sia interesiĝo, oni faros esperantajn kursojn por la fervojistoj de Padova.
D.ro BORIONE el Torino rekonas ke en sia urbo estas apatio rilate al organizado inter la fervojaj esperantistoj, malgraŭ tio ke ili estas ne malmultaj.
ZACCONI, resumante la diskutadon, sciigas ke siavice dum sia ĉeesto en Sardinio, okaze de la Nacia Kongreso de F.E.I., li interesiĝis kaj skribis rilate al organizado de kurso por fervojistoj, ĉar la tereno en tiu Regiono estas favora, kaj invitas ĉiujn fervojistajn esperantistojn propagandi pli vigle Esperanton, kaj la organizacion.

Neniu alia demandinte paroli pri la raporto de la Prezidanto, ĝi estas submetata al balotado kaj unuvoĉe aprobata.

Je la 2a punkto de la Tagordo (Raporto de la kasisto) la kasisto Pagan legante la konto-resumon de la financa movado de la jaro 1953-54, sciigas ke la bilanco fermiĝas kun aktivo de 12.602,- liroj, kontraŭ 3.940,- de la antaŭa jaro; pro tio neniu faras rimarkojn pri la administra konduto de nia kasisto kaj ankaŭ ĉi tiu raporto estas unuanime aprobata de la reprezentantoj, kiuj sincere kaj kore plaŭdis la raportinton, kolegon PAGAN. Li laŭdinde funkciis ankaŭ kiel kasisto de la organiza komitato de la VIa Internacia Kongreso de Verona.

Pri la 3a punkto de la Tagordo (Raporto pri la VIa kongreso) legas sian raporton la Sekretario de la L.K.K. kolego CERONI. El ĝi oni eksciias ke la administrado de la Kongreso lasis aktivon de proksimume 61.000 liroj, kiuj estis disdonataj parte al la diversaj institucioj esperantistaj:(I.F.E.A.; F.E.I.; I.F.E.F. kaj U.E.C.I.). Notinda rezultato kiun oni atingis malgraŭ la malhelpoj renkontitaj, sed - rilate al la ekonomia flanko - feliĉe solvitaj, ĉu pro seriozaj rabatoj konsentitaj de liverintoj, ĉu ankaŭ (post la fermo de la kongreso kaj konstatite la seriozeco kaj utileco de nia movado) dank'al kelkaj subvencioj flanke de publikaj instancoj.

Krom tio el la raporto rezultas ke oni rimarkigis al I.F.E.F. ke oni ne povas plu (ke ne estas konsilinde) organizi ankoraŭ niajn kongresojn en la maniero sekvita ĝis nun, tiel ke, okaze de proksima estonta kongreso de "Zurigo", estos prezentata projekto de regularo, kiu povos garantii la organizintojn kontraŭ malagrablaj surprizoj.

Ĉe tiu punkto okaziĝis diskutado pri la maniero organizi la estontajn kongresojn kaj pri la sintenado de nia nacia delegito al la kongreso de Zurigo.

Oni decidis elekti "karavanestron" kun la tasko kolekti la aliĝojn de la italoj kiuj volas partopreni la kongreson, kune kun la samtempa pago de la kotizaĵoj fiksitaj de la L.K.K. Nur post la enspezo de tiaj kotizaĵoj la karavanestro forsendas la aliĝojn al la sekretario de la L.K.K., garantiante al la sekretario mem la pagon de la kotizaĵojn, kiun li (la karavanestro) efektivigos ĉu pere de Bako, ĉu (se la pago per Bako ne estos ebla) persone ĉe sia alveno al la kongresejo.

La aliĝoj sempere sendataj al la L.K.K. de unuopaj aŭ pluraj personoj sendepende de la karavanestro, ne entrenas la respondecon de tiu ĉi lasta, sed nur tiun de la L.K.K. se ĉi tiu ilin akceptas sen akompano de la rilata kotizaĵo.

Kio dirite pri la italoj, devas valori ankaŭ por francoj, aŭstrianoj k.t.p.

Jen principe la normoj kiujn sekvos I.F.E.A. por la partoprenado de italoj al la Zurig'a kongreso; tamen pli precizaj kaj vastaj informoj estos ĝustatempe konigitaj al la asocianoj, tuj kiam estos konataj la determinoj fiksitaj de la LKK.

ANGERMAJER esprimas sian konsenton kun ni italoj.

Rag. BLASIMME el Roma proponas ke la membroj pagu monatam kotizaĵon al la kaso de I.F.E.A. jekonto de la internacia kongreskotizo: la propono celus ke je la dato de la Kongreso ĉiu membro estu kolektinta la sumon necesan por la elspezoj de la kongreso mem; sed iuj atentigas pri eblaj maloportunaĵoj, kaj pro tio la propono estas flankenmetata, por ke la estraro ĝin pritraktu dum proksima kunsido.

Ankaŭ tiu ĉi punkto fermiĝas per la aprobo de la raporto de la Sekretario, kaj gratulo por la tuta L.K.K.

Ĉe la 4a punkto de la Tagordo (Elekto de la nova estraro) kolego CERONI informas ke pro strikte personaj movoj li ne povas plu daŭrigi siajn funkciojn de Sekretario de I.F.E.A., kaj petas la ĉeestantojn memori tion kion li komunikis pri la elekto de novaj membroj de la konsilantaro. Li memorigas ke tio estas ankaŭ postulita de la Statuto de l'Asocio.

LA PREZIDANTO KAV. ZACCONI invitas kolegon CERONI'n restadi ankoraŭ unu jaron kiel Sekretario, kaj al li aldonas sian voĉon kolego GIMELLI, sed CERONI insistas en

sia decido, tial oni proponas Milano'n kiel novan sidejon de la Asocio, sed samideano QUARONE el Milano, kvankam danka pro tia propono, agrabla pro tio ke Milano estis la lulilo de la renaskiĝinta I.F.E.A., malakceptas la taskon. Tiun anstataŭ akceptas la kolegoj de La Spezia. Tiu urbo estos konsekvence la nova sidejo de I.F.E.A. Kiel partoprenantoj de la nova estraro estas elektitaj: ZACCONI kaj GIMELLI el Bologna, Rag. BLASIMME el Roma, CERONI kaj CORSO el Verona, FONTANA, LICOFONTE kaj SIGNORI el La Spezia, QUARONE el Milano, ALCIATI el Torino, krom D.ro BORIONE el Torino, Sekretario de F.E.I. kiel reprezentanto de l'Itala Federacio mem.

La nova estraro estos kunvokata dum la sekvanta monato Novembro, verŝajne la 7n, en la urbo Parma, en sidejo kaj horo difinota de la ĉesanta sekretario.

Pri la <u>5a Punkto de la Tagordo</u> ( Diversaĵoj) CERONI atentigas ke dum la proksima internacia Kongreso okazonta de la 8a ĝis la 13a de Majo 1955, oni proponos plialtigi la kotizaĵ-on por la aliĝo al I.F.E.F., kaj pro tio estas konsilinde plialtigi la kotizaĵon de I.F.E.A. de £.600 plus £.60 por la poŝtelspezoj de la Bulteno, ĝis £.750 jaraj, esceptante ĉiun alian kontribuonaĵon, se ne memvolas. D.ro BORIONE rimarkigas ke ankaŭ FEI plikarigis la jaram kontribuon de siaj membroj, tiel ke ankaŭ la IFEA-anoj devos konformiĝi kun la decidoj de la kongreso de Sassari, kaj sekve oni devas fiksi la jaran kotizaĵon en 800 liroj, entenate en tio ankaŭ la aliĝoj al F.E.I. kaj al I.F.E.F., kaj en 1000 liroj por tiuj kiuj deziras ankaŭ ricevi la revuon "L'Esperanto'n" de F.E.I.

Favore de tiuj el niaj membroj kiuj pagas la aliĝon al F.E.I. pere de sia grupo, la kotizaĵo de I.F.E.A. estas de £.550, ne entenate la abono al la revuo "L'Esperanto".

LA MURA el Forlì proponas kunigi en unu nura publikaĵo la bultenojn de ĉiuj asocioj, sed la propono ne estas akceptata.

Enfine la PREZIDANTO KAV. ZACCONI esprimas saluton kaj dankon al ĉiuj ĉeestantoj pro ilia partoprenado al la kongreslaboroj, samtempe oni esprimas la deziron de plena sukceso al la Esperanto Mondkongreso kiun oni organizos por la venonta Jaro en Bologna.

Oni fine invitas ĉiujn IFEA-anoj ne manki al la rendevuo kiun la Svisaj kolegoj jam fiksis en Zurigo por la VIIa Internacia Fervojista Esperanto-kongreso.

---

Il giorno precedente sabato 25 settembre i congressisti in compagnia di un nutrito gruppo di samideani di Massa dopo una bella gita in autobus a Portovenere con ritorno in vaporetto attraverso il meraviglioso golfo dei poeti; si sono ritrovati nel bel salone della Società Corale di La Spezia, gentilmente concesso, per ascoltare le numerose romanze magistralmente cantate in Esperanto dal noto Tenore Brani di Massa.

<u>KOMUNIKOJ PRI LA VIIa IFEF-KONGRESO EN ZURICH - BULTENO No. 1</u>

<u>Adreso:</u> L.K.K., poŝtfako Zurich 23
<u>Loka kongresa Komitato:</u> la S.A.E.F. (Svisa Asocio de Esperantistaj Fervojistoj) dum la lasta kunsido de estraro formiĝis jena kongresa komitato:
Prezidanto: HANS BIPP Vicprezidanto: OTTO WALDER
Sekretario: WALTER SONDEREGGER KSISTO : HANS NOLL
<u>Dato:</u> la semajnon de dimanĉo la 8a de Majo ĝis vendredo la 13a de Majo 1955.
<u>Kongresejo:</u> ni sukcesis kontrakti kun "LIMMATHAUS" grandrestoracio kaj hotelo kaj antaŭvideble ĉiuj aranĝoj okazos en tiu konstruaĵo.
<u>Kotizo:</u> ni informos dum la proksimaj semajnoj la landajn organizaĵojn pri perado de aliĝoj kaj akcepto de kongreskotizoj kaj petas trakti nur sur tiu vojo la aliĝojn. Al la Novembra numero de IFEF-bulteno ni aldonos aliĝilon.

RADIO ROMA (ITALIA) - DISSENDOJ EN ESPERANTO

OKTOBRO 1954a

448 vendredon la 1.an - Italaj belartaj urboj: VITERBO
449 merkredon la 6.an - Instruistoj kaj lernantoj en la antikva Pompei
450 vendredon la 8.an - Rideto abundas....sur la lipoj de la saĝuloj (dua premio pri originala prozo en la XVa Hispana Kongreso 1954)
451 merkredon l'13.an - Riveroj, lagoj kaj plaĝoj de Italujo
452 vendredon l'15.an - La sinjorino de la lampo: Florence Nightingale - okaze de la unua centjarfesto de la Ruĝa Kruco (1854-1954)
453 merkredon l'20.an - Vagante tra la stratoj de Romo
454 vendredon l'22.an - "Esperanta Ligilo" universala gazeto por la geblinduloj de la tuta mondo, okaze de ĝia 50.a datreveno (1904-1954)
455 merkredon l'27.an - Marguerite Santreuil kantas
456 vendredon l'29.an - Leterkesto kaj bibliografio

NOVEMBRO 1954a

457 merkredon la 3.an- Novaĵoj el Italujo
458 vendredon la 5.an - Italaj belartaj urboj: COSENZA
459 merkredon la 10.an- Itala folkloro
460 vendredon la 12.an- Leterkesto kaj bibliografio
461 merkredon la 17.an- Haltoj en Bologna (la urbo de la 40.a Universala Kongreso de Esperanto)
462 vendredon la 19.an- Kia estas via aĝo? (radio-fantazio)
463 merkredon la 24.an- La arbo-festo en Italujo
464 vendredon la 26.an- Novaj napolaj kanzonoj (kun muziko)

Prelegas: merkrede - S.ro Luigi Minnaja = vendrede - Prof.D.ro Vincenzo Musella

La dissendoj okazas de h. 18,50 ĝis h. 19,10 (M.E.T.)
Stacioj: metroj 31,35 = Mc/s.9,52 kaj metroj 49,92 = Mc/s.6,01

La Esperantistoj estas invitataj kunlabori en rubriko "Parolataj leteroj".Oni sendu paroladeton registritan sur paper strio (Sound Recording Tape) 1/4 x 1200, rapideco 7½ coloj = 19 milimetroj/sekundo. Registrado per ĉiu ajn magnetofona re_gistrad-aparato estas akceptata. La bobenoj estos rsendataj je niaj poŝtelspezoj. Bonvolu zorgi ke la enhavo estu 19 minuta, unika temo, eldirita en perfekta Espe_ranto sur nepre nova rubando. La temoj plej variaj, nur je internacia intereso (escepte de la politikaj).

LA KUNLABORADO ESTAS SENPAGA.

Skribu kaj konigu viajn impresojn, donu konsilojn! Lanĉu novajn ideojn.

La Fakestro: BLASIMME

---

ĈEĤA FERVOJ-OFICISTO KAJ LIA FILO deziras korespondi tutmonde kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj alumetskatolajn etiketojn. S.ro Karel Bartak, Jaselska 7, PŘEROV, Ĉeĥoslovakio.

---

MOVIMENTO ESPERANTISTA FRA I FERROVIERI IN SARDEGNA - La nostra Associazione ha interessato il Presidente del Dopolavoro Ferroviario di Cagliari onde studiare la possibilità di organizzare un corso di Esperanto fra i Ferrovieri di Cagliari e dintorni. Il Sig. SECHI Enrico sarebbe disposto a guidare il corso.

Avendo conosciuto di persona durante il Congresso Nazionale di Sassari, il cuo_re e l'entusiasmo dei sardi per l'Esperanto speriamo che il corso abbia ottimo successo ed a questo fine bene auguriamo.